


BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



8

SOFIA — AŬGUSTO 1961

E N H A V O

Paĝo

* * *	— Ni partoprenu aktive en la tutpopola movado por superplenumo de la ŝtata ekonomia plano	1
* * *	— Решения на разширения Пленум на ЦК на БЕС	2
Canko Murgin	— La instruado de fremdaj lingvoj kaj ni	3
Bonka Mandeva	— Renkonte al la nova lernojaro	4
D-ro P. Glavčev	— Hisar — landa kuracloko kun brila perspektivo	6
L. A. Holma	— La knabo kaj la maljunulo	7
Vladimir Bašev	— Rendevuo	10
Nano Nanov	— Dum la milito en Hungario	10
Ĥristina Veceva	— Kiamaniere ni fondis junularan grupon en Samokov	11
* * *	— Pri la VIII-a Festivalo de la Junularo	12
	ORGANIZA VIVO	12
Tinka Lakova	— Ekskurso de bulgaraĵ esperantistoj en Odeso	14
Simeon Hesapčev	— La Malgranda Soveta Enciklopedio pri Esperanto	15
* * *	— Deklaro kaj Rezolucio de XVI-a Pollanda Esperanto-Kongreso	16
	DEZIRAS KORESPONDI	17
* * *	— Окръжно № 5 относно културно-просветната работа	18

Abonkotizo: jara — 14 levoj, duonjara — 7 lv. Por eksterlando — 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro.

Reklamtarifo: 5 levoj por cm²; korespondanoncoj: 0,5 levoj por ĉiu vorto. Eksterlandaj adresoj publikigataj senpage. Ekstera kovrilpaĝo — 1000 lv.

LANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Ing. Cefo Flco, 44 Rruga Stafa, Tirane.
ITALIO: Julia Franceschi, via A. Boito 6, Padova
KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.
RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, București 5
SOVETUNIO: J. Kudrjavickij, PK 1255, Moskva K-9.
SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109—a.

Frontpaĝa bildo: La salono en kiu okazos la studentaj sportaj ludoj „LA UNIVERSIADO“ en Sofio — 1951



NI PARTOPRENU AKTIVE EN LA TUTPOPOLA MOVADO POR SUPERPLENUMO DE LA ŜTATA EKONOMIA PLANO!

Sub la gvidado de la Bulgara Komunista Partio nia popolo aktive partoprenas en la glora movado por akcelita disvolviĝo de la lando laŭ la vojo al socialismo, por superplenumo de la ŝtata ekonomia plano. En multaj lokoj en la lando starigas korpojn novaj grandegaj uzinoj (en Stara Zagora, Vraca k. a.); oni konstruas grandegajn barajlojn (Kârĝali en Rodopi Montaro k. a.) kaj novajn elektrocentralojn. Nia lando rapide disvolviĝas kaj jam atingis laŭ nivelo de evoluo multajn progresintajn okcidenteŭropajn landojn.

La bulgaraj esperantistoj partoprenas aktive en tiu glora movado kaj donas sian modestan kontribuon por la disvolviĝo de la lando. Ili helpas la Agrikulturajn Kooperativojn en plenumo de diversaj ekonomiaj taskoj. Pli ol 40 esperantistoj en Stara Zagora helpis la Agrikulturan Kooperativon en rikoltado de ĉerizoj kaj per aliaj kamparaj laboroj.

La lernantoj-esperantistoj en vilaĝo Polski Trâmbeŝ aktive laboras en la manipulado de tomatoj kaj sukcesplene prilaboras sian lernejan eksperimentan mastrumon en kiu ricevas bonajn rikoltojn.

Laŭ tradicio en la gimnazio „K. Veliĉkov“ — Pazarĝik ĉiusomere funkcias gelernanta riparista brigado „Esperanto“, gvidata de Petko Arnaŭdov, instruisto en la sama gimnazio. Ĉi-jare la brigado farbis interne la tutan lernejon: ĉambroj, salonoj, kabinetoj ktp kaj preparis ĝin por la nova jaro. La plej fervora brigadistino Stefana Karaĝova somerumas en Pollando ĉe sia esperanta amiko. La plej fervora lernanto Stefan Angelov, kiu ne estas ankoraŭ esperantisto, estos la unua kursano dum la nova lernojaro. Ĝis nun en 12 tagoj la brigado ŝparis al la lernejo ĉirkaŭ 5000 levojn. Nun ili farbas ankoraŭ benkojn, pordojn, fenestrojn, nigrajn tabulojn.

Pli ol 40 aliaj societanoj, en siaj entreprenoj donis po 10 ĝis 15 labortagoj en helpo al la laborkooperativaj mastrumoj en la rikoltado.

La esperantistoj en Sofio aktive partoprenas ĉiudimande en helpo de la agrikulturaj kooperativoj en la vilaĝoj Busmanci, Kremikovci, Ĉepinci, Kriŭina k. a.

Gekamaradoj, aktive partoprenu en la plenumo de la ekonomia plano—1961, informu nin pri via partopreno en ĉiuj taskoj, sendu ankaŭ fotoĝrafiajn. Ĉiujn materialojn ni publikigos en „Bulgara Esperantisto“.

Al aktiva laboro helpe al la agrikulturaj kooperativoj!

РЕШЕНИЯ

НА РАЗШИРЕНИЯ ПЛЕНУМ НА ЦК НА БЪЛГАРСКИЯ ЕСПЕРАНТСКИ СЪЮЗ

състоял се на 3 юни 1961 г.

След като изслуша и обсъди докладите по идеологическото и организационно състояние на Съюза, разширеният пленум реши:

1. Одобрява докладите и задължава ръководствата на дружествата да разгледат работата си в светлината на решенията на пленума, да набележат мерки за идейното и организационното укрепване на дружествата, за активното им включване в мероприятията на Отечествения фронт по изпълнение на народостопанския план.

2. Да се засили идеологическата и идейно-възпитателната работа сред есперантистите, като се разработят конкретни мероприятия.

3. Да се укрепи културно-просветният отдел, като се привлекат повече доброволни сътрудници, които да подготвят материали за просветната дейност на дружествата. Културно-просветната работа да се води по план.

4. Редакцията на „Булгара есперантисто“ решително да подобри работата си в идейно-политическо отношение.

Директивните статии да се поместят на български език, за да се запознаят с тях новите есперантисти.

Редакцията да подобри библиографския отдел, като внимателно се критикуват враждебните нам издания на есперанто.

Дружествените ръководства да определят дописници, които редовно да отразяват живота по места. Да се дават четива за новите есперантисти.

5. Ръководствата на дружествата да обърнат сериозно внимание на своята работа сред младежта и се грижат за възпитанието и издигането на млади активисти.

6. Бюрото на ЦК да укрепи отдел „Международна кореспонденция“ с подходящи другари, които устно, писмено и чрез съюзния орган да подпомагат дружествата и отделните есперантисти за по-целесъобразно кореспондиране.

7. ЦК и дружествата да подпомагат ръководителите на курсове в тяхната квалификация, като още това лято организират курсове за подготовка на лектори.

8. Задължават се есперантистите при заминаване с пропагандни задачи в чужбина предварително да се допитват до ЦК на БЕС.

9. ЦК на БЕС да направи всичко възможно за издаване още тази година на учебници и речници. Всяка година да се издава поне по един учебник.

10. ЦК на БЕС периодически да разглежда дейността на отделните дружества като обобщава добрия опит. По-слабите дружества да се поставят под постоянна грижа на ЦК на БЕС, като по-често се изпращат указания и конкретна помощ.

11. Да се образуват нови дружества само там, където за това има създадени трайни условия.

12. Ръководствата да обърнат сериозно внимание по организационното затягане на дружествата. Изплащането на членския внос да става по тримесечия по установения образец.

LA INSTRUADO DE FREMDAJ LINGVOJ KAJ NI

En la kuranta jaro ĉiuj klerigaj instancoj, institucioj kaj kulturaj organizaĵoj amase partoprenis en la organizitaj konferencoj kaj kunvenoj, dediĉitaj al la instruado de fremdaj lingvoj en niaj lernejoj, gimnazioj kaj universitatoj.

La konkretaj konstatoj kaj rekomendoj estas similaj kaj pro tio facile ĝeneraligeblaj: En nia lando la ŝtataj elspezoj por la instruado de fremdaj lingvoj estas tre grandaj. La lernantoj kaj la studentoj dediĉas multe da tempo en la lernado de fremdaj lingvoj, sed la rezultoj estas tre modestaj. La respondecaj gekamaradoj kaj la koncernaj fakuloj alarme atentigis pri tiu nekontentiga rezulto kaj apelis al plua streĉo de la fortoj fare de la instruantoj kaj instruatoj; al plibonigo de la instruometodoj, al kompilo kaj verkado de diversaj allogaj kaj ligitaj kun la vivo gradigitaj lernolibroj. Kvankam malofte iufoje neesperantistoj, kiuj uzas fremdajn lingvojn en sia ofico aŭ entrepreno, proprasparte venas al la konkludo pri enkonduko ankaŭ de Esperanto en siaj laborlokoj. La lasta konkludo, kvankam sporada, estas atentinda, des pli ĉar ĝi estas elvokita de la praktiko mem.

Kia estas la starpunkto de la esperantistoj pri la lernado de fremdaj lingvoj? Bedaŭrinde ofte estas misa, malĝusta, kompromitanta nin mem. La intensaj kontaktoj inter la ŝtatoj kaj diversnaciaj organizaĵoj rapide kreskas kaj oni ĉiam pli kaj pli akre sentas la mankon de unika internacia lingvo. En la nuna etapo de la socia evoluo la mankanta-rekonita de ĉiuj—internacia lingvo—estas anstataŭigita per lernado de fremdaj lingvoj. Iuj esperantistoj ne deziras kompreni tion kaj militas kontraŭ la instruado de fremdaj lingvoj. Tio malbone prezentas nin al la socio. La „lingva“ ŝovinismo de

tiuj fanatikaj esperantistoj blindigas ilin, ili perdas ekvilibron kaj de „fervoruloj“ laŭ la rezultoj de sia agado ili transformiĝas en malamikoj de Esperanto.

La afero estas pli komplika ol supozas la esperantistoj-kontraŭuloj de fremdlingva instruado. Ili sin prezentas kiel limigitajn filistrojn. Ili konsideras la posedon de fremdaj lingvoj kiel finan celon. Fakte ĝi estas tia nur por tre limigita nombro da lingvistoj pri kompara lingvistiko. La grandega plimulto lernas kaj strebas al la fremdaj lingvoj nur pro tio, ĉar per ili oni povas atingi kaj ekkoni la vivon de aliaj popoloj kaj ĉerpi la necesajn informojn aŭ materialojn.

La lingvo estas rimedo, ilo de la homa penso. La naciaj lingvoj estas malfacilaj, sed ili malfermas larĝan vojon al la vivo de la popoloj. Esperanto estas tre facile lernebla. En tiu punkto nenies nacia lingvo povas konkurenci al Esperanto. Tio estas la esenca avantaĝo de Esperanto antaŭ la naciaj lingvoj kaj en ĝi estas kaŝita ĝia estonta venko.

Tamen la literaturo en Esperanto estas ankoraŭ malriĉa. En Esperanto estas tradukitaj nur la klasikaj verkoj preskaŭ el ĉiuj lingvoj, sed ofte mankas tradukoj de la nuntempaj verkistoj. Mankas faka literaturo pri la diversaj sektoroj de la tekniko. Mankas teknikaj revuoj el kiuj oni povus ĉerpi informojn pri la lastatempaj inventaĵoj. En tiu senco Esperanto ne povas kontentigi komplete la bezonojn kaj pro tio estas kruele ridindaj tiuj esperantistoj, kiuj kontraŭstarigas Esperanton al la fremdaj lingvoj.

Kion fari? Ĉu ĉesigi nian noblan kaj humanan agadon? Ĉu kapitulaci?

La kampo por nia agado estas tre ege vasta. La kondiĉoj en nia lando—tre favoraj. Ni devas daŭrigi nian kulture agadon per multobligitaj fortoj, sed ni nepre devas koni la ĝustan rolon kaj nedisputeblan lokon de Esperanto en la vivo. Ni ne devas trograndigi kaj fanfaroni. Ni devas esti

modestaj. Ni lasu, jam estas tempo, ke la rezultoj de nia agado disfamigu la utilecon de nia afero.

Grava argumento en la manoj de niaj propagandistoj ekzemple estas la multfoje pruvita fakto, ke lernanto, kiu lernis unue Esperanton en daŭro de unu jaro pli bone progresas en la lernado de la fremdaj lingvoj ol tiuj kiuj ne lernis Esperanton. Ni konigu tion al la instruistoj kaj profesoroj. Kiel profesiuloj en la instruado, kiuj detale interesigas pri la bona sukceso de siaj lernantoj, ili tuj ekdezirus esplorcele provi... kaj plua sukceso estas garantiita.

La manko de faka literaturo povas esti provizore anstataŭita per interŝanĝo de sperto inter samspecaj entreprenoj. La esperantistoj devas profunde koni la taskojn pri perfektigo de la produktado en sia entrepreno. Ili devas zorgi pri kontaktigo de Entrepena Sindikat—Komitato kun laboristoj kaj Inĝenieroj el samspecaj entreprenoj en eksterlando. Laŭ tiu maniero povas naskigi utila kaj fruktdona kunlaboro inter la inventemuloj en la maŝinkonstruado kaj teknologio.

En kunlaboro kun la Pac—Komitatoj ni devas starigi vastan internacian korespondadon. La rezultoj povas esti kelkdirektaj: ni diskonigos la lastajn sukcesojn de nia lando en la konstruado de socialismo, ni ekscios interesajn informojn pri la vivo kaj la bataloj de la laboristoj en la kapitalismaj landoj, ni havigos publikigendajn materialojn por nia gazetaro, ni helpas al la honestaj homoj en Okcidento bone orientigi en la ĝangalo de la kapitalisma informado. Multnombraj amikoj de la progreso arde soifas pri gustaj informoj el nia lando.

Multaj junuloj, laboristoj kaj progresemaj intelektuloj, eksciant pri la grandaj sukcesoj de Esperanto en nia lando intence lernis Esperanton por starigi senperan kontakton. Jen kion skribis al ni freŝbakita pacamiko el Latina Ameriko: „Per la legado de Esperanto-revuoj eldonataj en via lando

mi jam scias multon pri la vivo en Bulgario. Per la naciaj ĵurnaloj mi nenion veran scias pri via lando, ĉar la Novaĵ—Agentejoj estas usonaj kaj ili ne diras la veron. Ili konstante diras la malveron. La popoloj de Latina Ameriko ne havas propran fidindan fonton por koni la veron pri la malproksimaj landoj de socialismo, sed per la Esperanto-revuoj kaj libroj ni ekkonas la veron pri viaj landoj.

Mi atendas vian longan respondon...”

Al tiu kortuŝa konfeso komentario estas absolute superflua.

Kamaradoj,

Antaŭ ni staras grandaj, sed noblaj taskoj. Se ni streĉus niajn kunordigitajn intelektajn kaj fizikajn fortojn ni efektivigos ilin. Tiel ni plenumos nian esperantistan devon al nia lando kaj al la tuta homaro laŭ la testamento de Zamenhof.

Per daŭra kaj konkreta uzado ni konkeru lokon por Esperanto en la vivo!

Ni laboru kiel talpoj, sed ni ne estu blindaj kiel ili.

Canko MURGIN

RENKONTE AL LA NOVA LERNOJARO

Baldaŭ forpasos la belaj someraj tagoj. Venos la aŭtuno. La ĝelernantoj denove plenigos la lernejojn per bruo kaj babilado. Kaj ni enpensigas: ĉu oni aŭdos tie ankaŭ la belsonan esperantlingvan interparolon? Ĉu oni atendas kun senpacienco la ricevon de la unua fremdlanda letereto?

Havante nur mallongan, dujaran sperton en la instruado de Esperanto, mi ĉiam multe pensas pri tio, kial ni ne sukcesas venigi sufiĉe da junaj homoj inter ni. Kio malhelpas ai ni? En iuj mezlernejoj ekzistas kondiĉoj por instrui Esperanton. La lernejestroj kunhelpas arangon de kurso, ni faras la propagandon, oni enskribigas kaj ektendas la tagon de la unua leciono.

Kaj ĝi alvenas. La gelernantoj rigardas nin scivole. Ĉu ni kunportas la lernolibrojn? Ili volas propraokule vidi ilin, la lernolibrojn de tiu mirinda lingvo, kiu malfermas al ili la pordon de nekoniata, vasta mondo. Tamen, lernolibroj mankas, mankas la ŝlosilo de la pordo. Do venis la unua disreviĝo. Ja ili alkiutimiĝis al lernolibroj.

Nu, bone ili skribadas ĉion. Tamen la skribaĵo de novelernata lingvo ne ĉiam estas facile legebla. Kaj ĝis la sekvonta leciono (ordinare post unu semajno) ili forgesas preskaŭ ĉion.

„Ĉu estas vortaroj?“ — demandas la gelernantoj. Ni denove ne scias kion respondi. Ili mankas.

Kiel ajn, la kurso komenciĝas, daŭras kaj finiĝas. La kurso finiĝas, tamen esperantistoj fariĝas nemultaj. La pli granda parto de la kursanoj nur diras: „Mi estas nova esperantisto. . .“

Tiu ĉi bildo ne estas bela, ĉu ne? Tamen, se oni ne havas lernolibrojn, oni ne povus atingi kontentigajn rezultojn.

Mi opinias, ke unu el la plej gravaj devoj de la Estraro de Bulgara Esperantista Asocio estas certigi al ni taŭgajn lernolibrojn kaj Esperanto-bulgarajn vortarojn.

Provizore oni disvendas la lernolibron de As. Grigorov, tamen ĝi taŭgas kiel gvidilo por la instruisto, sed ne por la lernantoj. La lernantoj deziras havi gramatikon, vortaron ktp.


Cetere, bona lernolibro estas necesa ankaŭ por la instruistoj. Kiel oni scias multaj inter ili estas sen pedagogia sperto, nepagataj volontuloj-fervoruloj.

Alproksimiĝas la nova lernjaro. Ni demandas nin: „Ĉu en nia lando ne estas homoj kapablaj verki taŭgan, agrablan kaj interesan lernolibron, facile lerneblan, por junuloj kaj plenaĝuloj, kun hejmaj taskoj, bona vortaro — lernolibron ne nur por kursa laboro, sed ankaŭ por memstara lernado?“

Kaj kial ni rapidas krei esperantiston nur en 20—30 lecionoj? Do, estu ankaŭ daŭriga kurso! Estu ankaŭ supera kurso por konatiĝo kun Esperanto-literaturo! Kial ni rapidas krei kriplulojn en nia movado? Nur per daŭra lernado, ni kreos esperantistojn, amantajn la movadon, la homaron, kapablajn batalantojn por paco.

Ni ne preterlasu la eblojn de la lernjara sezono! Ni varbu la junularon, kaj ni retenu ĝin en niaj vicoj!

Bonka MANDEVA



K-do S. Hesapčiev instruas al kursgvidantoj en Sofio

ĤISAR — LANDA KURACLOKO KUN BRILA PERSPEKTIVO

D-ro P. GLAVĈEV,

Supera scienca kunlaboranto ĉe la Instituto de
Kurortologio kaj Fizioterapio

Nia lando abundas per valoraj klimataj riĉaĵoj kaj multaj mineralakvaj fontoj. Ĝi entute prezentas vastan, belan kaj riĉan kuraclokon. En la sinoj de la montaroj Balkano, Sredna Gora, Rilo, Rodopo kaj Pirino abundas multaj ĉarmaj belaĵoj, netuŝitaj naturaj riĉaĵoj kaj kuracaj fontoj.

Efektive Bulgario disponas pri diversspecaj montaj, maraj, banaj kaj ŝlimaj kuraclokoj al kies regula utiligo oni apenaŭ nun decide alpaŝas. Ĉe ni estas lokoj kun malalta kaj meze-monta karaktero, sed ankaŭ tiaj kun preskaŭ tipa alpa aspekto. Nia Nigramara Riviero abundas je lumo kaj suno de frumateno ĝis malfrua vespero. En Bulgario abundas la suno, la fruktoj kaj la legomoj. Ĝi, la tuta, estas suna lando. Niaj kuraclokoj dum la lastaj jaroj estas fundamente reorganizitaj, plibonigitaj kaj rekonstruitaj. La eksterlandanoj, kiuj vizitas nian landon, havas senperajn impresojn pri tio.

Dum multaj jaroj nia nacia kuracloko Ĥisar posedas la gloron de kuracloko vizitata precipe de hepataj kaj renaj malsanuloj. Tiu famo de Ĥisar datas jam de la romia epoko, kiam la romianoj, laŭ certaj historiaj faktoj, eĉ la imperiestro Justinjan, profitis la kuracajn kvalitojn de la kuracloko kaj ĝiajn mineralajn akvojn. Laŭ informoj de la Ministerio de la Sanprotektado estas videble, ke tie ĉiujare po kelkaj miloj da malsanuloj pro hepataj kaj renaj malsanoj serĉas kuracan helpon. La klinikoj de gastroenterologio, internaj malsanoj kaj urinologio ĉe la Institutoj de Specialigo kaj Perfektigo de la Kuracistoj en Sofio kaj Plovdiv, kiel ankaŭ la kliniko ĉe la Scienc-

Esplora Instituto pri Kuracloka kaj Fizika Terapioj, direktante tiujn malsanulojn al Ĥisar, konfirmis sendube la postsekvantan rezulton ĉe la malsanuloj pro gal—kaj ren-kalkulusa malsanoj, posthepatitaj statoj kaj kronika hepatito. La minerala akvo de la fonto „Momina Banja“ en Ĥisar, kiu estas uzata por trinko de la malsanuloj, estas hidrokarbona-natriosulfata. Laŭ la sperto de nuntempaj famaj fakuloj la hepataj malsanoj estas kuracataj tre bone de tia akvo, simila al kiu estas fame konataj en eksterlando banlokoj: Karlovi Vari en Ĉeĥoslovakio, Esentuki kaj Ĝermuk en USSR, Vitel en Francio k. a.

Lastatempe, en la Instituto pri Kuracloka kaj Fizika Terapioj, surbaze de faritaj klinikaj observoj, oni sukcesis pruvi, ke en Ĥisar, pro la speciala seka kaj varma klimato de la kuracloko, ĉefe dum la someraj monatoj, por kuracado estis konvenaj malsanuloj de kronikaj reŭmatismo kaj nefrito. Evidentiĝis, ke krom la bankuracado, ankaŭ la klimata profilaktiko de la recidivoj je la reŭmatismo estas esperiga kuracrimedo. La malsanuloj pro kronika nefrito, kies kuracado, laŭ la nuntempaj eblecoj de la medicina scienco, estas eksterordinare malfacila, sub la protektanta influo de la seka kaj varma klimato, en kombino kun dieta kaj frukta kuracadoj, donas kuraĝigan rezulton kaj plibonigon en konsiderinda grado. Ne hazarde ek de 1959, impona nombro de malsanuloj pro kronika nefrito kaj tiaj post malsano de akuta nefrito, oni sendas el eksterlando (Pollando, GDR) por kuracado en Ĥisar.

Post la konstruo dum la lastaj jaroj de multaj novaj bansanatorioj kaj konvena bonarango de Ĥisar, nun ĝi respondas al ĉiuj nuntempaj postuloj de moderna kuracloko kun grandaj eblecoj kaj brila perspektivo pri evoluo en tiu direkto.

El bulgara:

D-ro St. Moraresku

Leif A. HOLMA

LA KNABO KAJ LA MALJUNULO

La maljunulo kondukis la knabon je mano. La mano estis malgranda, varma kaj fidema. La knabo iris senĉapele kaj havis densajn malhelajn buklojn.

Ili iris en la frunto de la longa kolono el malliberuloj.

En iu loko ili vidis kamparon, kie sin paŝtis bovinoj. La knabo emociigita ilin montris:

— Rigardu, avo, kiom da ĉevaloj!

La maljunulo ekridetis:

— Tio ne estas ĉevaloj, nepeto. Tio estas bovinoj.

La knabo estis naskita en granda urbo kaj dum ĉiuj siaj sep jaroj ĝi loĝis inter la malvarmaj grizŝtonaj skatoloj. Ĝi neniam estis vidinta bovinojn.

La maljunulo diris:

— Ili donas al ni lakton.

La knabo sciis tion. Ĝi longe rigardis al la bovinoj kaj poste ekĝemis:

— Avo, mi soifas.

— Mi scias, nepeto — respondis la maljunulo. Ĉiuj soifas ĉi tie. Toleru. Eble baldaŭ oni donos al ni ripozon, tiam ni trinkos.

La knabo ĉesigis la plendon.

Post iom ĝi demandis:

— Avo, kial paĉjo ne estas kun ni?

La maljunulo respondis:

— Li devis resti. Oni kondukis lin al laborloko.

— Ĉu ni ne plu estos kune?

— Ne.

La knabo pripensis kaj ekdemandis kun plorgema voĉo:

— Sed kial ni iras, se paĉjo ne venis kun ni?

— Mi ne scias, nepeto. Pridemandu malmulte. La soldatoj ne ŝatas, kiam

Leif Arnold Holma estas norvega laboristo. Antaŭnelonge li gajnis premion en la konkurso por plej bona rakonto. La konkurson organizis la norvega tagurnalo „Dagbladet“, kiu sin deklaras kontraŭ la atomaĵ armiloj.

ni parolas. Ĝi estas malpermesita. Se vi deziras diri ion, parolu mallaŭte.

— Bone. La knabo komencis flustri. — Ĉu la soldatoj koleras al ni?

La maljunulo senparole kapjesis.

— Kial ili koleros? Ja ni neniom kulpas.

La maljunulo respondis lacigite:

— Ĉar ni estas militkaptitoj kaj ili estas soldatoj, komisiitaj gardi nin.

La maljunulo premis pli forte la malgrandan maneton. La knabo ekploris:

— Kie estas panjo?

— En la ĉielo.

— Tie, kie estas Dio kaj la anĝeloj.

— Jes, ĉe la anĝeloj. Ĝi bonfartas tie.

La knabo enpensis, sed ne plu demandis kaj poste tute forgesis pri tio.

La maljunulo pensis: „Feliĉulo. Li komprenas tre malmulte. Li ne scias eĉ kio estas la morto. Kvankam eble li mem baldaŭ mortos.“

Ili piedmarŝis ek de la mateniĝo. Tagmeze la kolono eniris iun vilaĝon, post kiu fluis rivero.

La vilaĝa panbakejo estis ĉe la strato, freŝbakita pano bonodoris.

La knabo diris en ploro:

— Mi estas malsata, avo.

La maljunulo rediris:

— Toleru. Ja, ni manĝis antaŭ ol eliri el la koncentrejo.

— Ĝi estis iam kaj al mi oni donis tre malmulte.

— Estas nenio. Eble baldaŭ denove ni manĝetos. Pensu pri io alia kaj vi forgesos la malsaton.

La loĝantoj de la vilaĝo, malriĉaj vilaĝanoj, staris en grupetoj kaj silente rigardis al la malliberigitoj. Je la kru-cvojo ludis du knabinoj, puŝetante per

la antaŭa parto de la ŝuo ruĝan vitroglobeton. La knabo sin kaŝis de la fremdaj homoj apud ŝia avo, sed tuj post kiam vidis la knabinojn, ĝi eliris. La plenaĝuloj estis malproksime, sed la knabinoj, ĝiaj samaĝulinoj, daŭrigis ludi sen zorgo. Iu ruĝa vitroglobeto restis sur la mezo de la strato. La knabo rapide kliniĝis kaj ĝin prenis. La maljunulo diris zorgoplene:

— Jetu la globeton, ne atendu. Se la soldatoj estus vin vidintaj, ili mortigus vin.

La knabo des pli fortike premis la globeton en sia mano.

La vojo kurbiĝis kaj preteriris laŭ la rivero. Ĝi estis larĝa, granda. Ambaŭflanke de la vojo kaj rivero etendiĝis kampoj. La tritiko estis maturiĝinta kaj la vento pelis la flavajn ondojn. La malliberuloj rigardis kiamaniere la vilaĝanoj rikoltas. La ĉevaloj, maŝinfalĉiloj, garboligiloj igis la knabon forgesi provizore pri siaj malĝojoj.

Poste ĝi denove plorgemis. Ĉiam pli kaj pli ĝi malsatis, la piedoj doloris. En la kaŭĉuksuojn eniĝis sableroj, la uzitaj laĉoj sin disŝiris la plandumoj falis. La maljunulo ne kuraĝis halti por ligi la ŝuojn. La soldatoj rigardis rekte al la malliberuloj kaj ne permesis al ili malrapidiĝon. La nigraj paftuboj minace rigardis al la kolono kaj la maljunulo sciis, ke tio ne estas ŝerco. Li provis konsoli la knabon:

— Eble baldaŭ ni atingos — li diris — kaj vi ripozos.

La rivero fluis glate, mankis naturaj bariloj. Ie ĝi venis proksime al la vojo. La maljunulo konis kaj la riveron kaj la vojon; li klarigis, ke post kelkaj horoj sekvos granda ponto. La knabo daŭre petis manĝi. Tiam la avo diris:

— Kiam ni atingos la ponton, certe ni haltos kaj manĝetos.

Sur la bordo kreskis alta herbo. Ili vidis sur la akvo aron da anasoj. La knabo neniam estis vidinta tiom grandajn anasojn. La maljunulo devis klarigi kiel la anasoj remas per siaj plataj piedoj, plongas por kapti nutraĵon.

Poste li rakontis la fabelon pri la nano Jakob.

Kiam la fabelo finiĝis, la knabo demandis:

— Ĉu en la arbaro abundas la sovaĝbestoj, avo?

— Abundas.

— Mi dezirus esti leono por ke mi formangu la soldatojn, kiuj nin ekskortas.

— Ne, nepeto! Tiel vi ne devas paroli.

La knabo eksilentis. Sed iu junulo, kies tuta kapo estis bindita, sin turnis kaj diris:

— Kial vi timas, maljunulo? Estas egale — ni ne vivos longe.

— Pli mallaŭte, ĉar aŭdos la knabo.

— Ĉu tio gravas? Baldaŭ li mem vidos. Aŭ ĉu vi estas surda kaj ne aŭdas la pafojn en la fino de la kolono? Ili mortpafas tiujn, kiuj postrestas.

La maljunulo koleriĝis:

— Mi aŭdas tre bone kaj mi scias kio okazas. Sed kial ni timigu la infanon?

La suno translokiĝis okcidenten. Proksimiĝis la vespero. La nuboj malaperis. La vojo fariĝis seka, polvoplena. La kolono iris tra griza nubo. La polvo kovris la vestojn de la maljunulo ĝis la zono kaj amasiĝis sur la vizaĝo de la knabo. La knabo ploris amare, sed ĝi nenion diris, ĉar la polvo plenigis kaj sekigis ĝiajn nazon kaj buŝon, kaj ekpenetris en la gorgon. Poste ĝi ĉesis plori.

Ili trapasis ankoraŭ unu vilaĝon, sed la knabo eĉ ne rimarkis tion. La polvo gluis al ĝi la okulojn kaj la orelojn. Ĝi ne vidis la scivolemajn, kiuj amasiĝis preter la vojo por rigardi la malliberulojn.

Horon post kiam ili trapasis la vilaĝon, la maljunulo rompis la longan silenton:

— Mi vidas la ponton, knabo. Baldaŭ ni atingos.

La knabo silentis kaj tiam la maljunulo ripetis pli laŭte.

— Baldaŭ ni atingos la ponton. Mi jam vidas ĝin. Restis mallonga vojo.

Transe estas herbo, granda herbejo.
Tie ni ripozos. Ĝu vi ne aŭdas?

Nenia respondo.

Nun nur la mano de la avo ne permesis al ĝi fali. Sed ili jam ne estis en la frunto de la kolono. La pafoj aŭdiĝis ĉiam pli proksime.

La piedoj de la knabo venkis ankoraŭ unu monteton, sed ĝi ne povis pluiri. La avo provis ĝin vigligi. La knabo ne aŭdis. Tiam la maljunulo ĝin prenis kaj ekportis tra la ponto.

La maljunulo kun la knabo en la manoj iris peze sur la herbo kun rigidaj kruroj. Malantaŭe aŭdiĝis klako de soldataj botoj, sed li ne turniĝis.

La knabo ne aŭdis la falcon de la aŭtomatpafilo kaj eksentis nenian doloron, kiam ĝin pikis la varmegaj, malmolaj kugloj.

Momenton antaŭ la falo de la maljunulo la mano de la knabo sin malfermis kaj io falis sur la herbon. La ruĝa vitroglobeto. . .

Tradukis : Canko MURGIN



N. GEORGIEV

**Knabino
kun fungoj**

Vladimir Bašev

RENDEVUO

Nigrajn flokojn dise kardash vento,
pluvfadenojn ŝpinas vent' kun ĉarm'!
Kaj esploras gutoj kun lamento:
„vi ne venis, vi ne venis jam!“

Ne koleras mi knabin' amata,
scias mi, ke pluv' malhelpis viŝ.
El ni ambaŭ tiu venis tamen,
kiu amas pli!

Tradukis: At. Lakov

DUM LA MILITO EN HUNGARIO

Decembro 1944. Ni estis volontuloj en taĉmento de la Unua Bulgara Armeo. Kune kun la soveta armeo de marŝalo Tolbuĥin ni persekutis la disbatitajn naziajn hordojn. La vintro estis malvarma kaj furioza. La neĝeroj kaj la nebulo pinĉis la vizaĝojn. Ni atingis Beogradon en momento kiam ĵus la germanaj faŝistoj, forte rezistantaj, estis disbatitaj. Dekstre kaj maldekstre de la beograda stacidomo iliaj kadavroj montriĝis elsub la neĝo, kie pro sia rezistado ili trovis indan lokon. La sovetaĵoj pilotoj senĉese atakis la antaŭajn poziciojn de la malamiko, fortiriginta okcidenten. Nia taĉmento atingis urbon Sombor, kie la malamiko estis disbatita.

Aprilo 1945. Iun tagon nia taĉmento solene marŝis sur la stratoj de Pécs sub la sonoj de orkestro. Ambaŭflanke de la stratoj svarmis hungara popolo. Ni rimarkis tri virinojn kaj unu viron kun esperantistaj insignoj sur la brusto. Ili plej laŭte aplaudis nian taĉmenton, svingante en siaj manoj bukedojn. Pli poste ni devis kunlabori kun la novaj hungaraj ŝtatorganoj. Foje ni volis organizi unu tuturban vesperfeston kaj tiucele ni vizitis la klubon de la Hungara Komunista Partio en Pécs. Tie ni hazarde renkontis la tri esperantistinojn, kiuj tiom arde kaj flame salutis nian taĉmenton sur la strato. Ni ekĝojis, ĉar ili faciligos nin en la organizado de la vesperfesto. Ni eksciis, ke la menciitaj hungaraj geesperantistoj ĵus estis liberigitaj de la soveta armeo el iu malliberejo de Ĥorti. En la mo-

mento ili estis partiaj funkciuloj en Pécs kaj en la ĉirkaŭaĵo. Anjo Ruzics, Irenio Prassnig, Elenjo Babela kaj Ludoviko Akos. De tiu momento Esperanto fariĝis oficiala lingvo inter la stabo de la Bulgara Taĉmento kaj la reprezentantoj de la hungara aŭtoritato. La hungaraj kamaradoj ĉiamaniere helpis nin en nia ĉiutaga laboro. Ili organizis renkontigojn kun niaj soldatoj. Niaflanke ni helpis al la hungaraj loĝantoj en liverado de hejtaĵoj per niaj ŝargaŭtomobiloj kaj en starigo de novaj ŝtatorganoj.

Foje, ni, grupo da bulgaraj soldatoj-esperantistoj, sciigis per la lokaj ĵurnaloj ke oni organizas kunvenon en Pécs. Venis multaj urbanoj kaj bulgaraj soldatoj. En tiu kunveno ni klarigis antaŭ la hungaroj la neceson pri likvido de la faŝisma reĝimo. Tiamaniere jam en la fajro de la milito la bulgaroj kaj hungaroj montris sian fratan deziron vivi en paco. Montriĝis ankaŭ la signifo de Esperanto tiurilate.

Dum la milito ni pasigis ĉertan tempon ankaŭ en aliaj hungaraj urboj: Seged, Nadkaniĵa kaj Budapeŝto. Ĉie ni renkontis esperantistojn. En urbo Seged la sekretario de la Komunista Partio Imre Tombac estis esperantisto. Li multe helpis nin kaj post la milito ni interkorespondis. Neniam ni forgesos la bildon de la milito en Budapeŝto.

Kaj fine, je la 9-a de majo 1945 la soveta standardo ekflirtis super Berlino. . . Post longa kaj peza milito en Eŭropo revenis la paco.

Nano NANOV

KIAMANIERE NI FONDIS JUNULARAN GRUPON EN SAMOKOV

Ĉiuj gelernantoj, ĵus finintaj la kurson por komencantoj, malpacience atendis la 17-an de majo, kiam devis okazi la fermo de la kurso. Jen, la salono estas bone ornamita; la ĉeestantoj kun intereso trarigardas la speciale aranĝitan ekspozicion de revuoj, albumoj, leteroj, poŝtkartoj ktp. La prezidanto de la societo — k-do Trifonov malfermis la kunvenon.

Aperas du knabinoj — kvazaŭ fremdlandanoj kaj ili interparolas en Esperanto, dum aliaj tradukas. K-do Trifonov faras gramatikan analizon de unu Esperanto-frazo kaj denove estas aŭskultata belsona Esperanto en versoj, rakontoj, dialogoj, kantoj.

K-ino Ĥr. Veceva, sekretariino de la societo, disdonas al ĉiuj kursaninoj certigilojn kaj esperantajn insignojn. Ŝi bondeziras al la ride-tantaj lernantoj viglan kaj utilan agadon en la fondota nova junulara grupo, konsistanta el 20 membroj.

Per kelkaj varmaj vortoj la novaj geesperantistoj dankas al siaj gvidantoj—Kjulanova, Veceva kaj Trifonov kaj prezentas ĉarman buk-edon al k-ino Veceva.

En la fino oni anoncis, ke la novaj esperantistoj devas veni la 31-an de majo al la societa kunveno, kie estas fondota la junulara grupo.

La societa estraro bone komprenis, ke la momento estas tre delikata. Ĉu ni sukcesos reteni niajn junajn geamikojn en nia medio? Ĉu ni sukcesos krei interesan atmosferon kaj bonhumoron? Tiuj estas la demandoj kiuj staris antaŭ la societa estraro.

Pro okupiteco aliloke ne ĉiuj sukcesis ĉeesti la fiksitajn kunvenon-renkonton kun la

junuloj. Tamen la sekretariino de la societo, ne allasis enuon kaj sukcesis kapti la atenton de la lernantoj per diversaj amuzoj kaj ludoj. La skribitaj sur la tabulo frazoj: „Karaj junuloj, bone venintaj en niajn vicojn“, ktp estis legitaj kaj analizitaj. Oni donis gramatikajn klarigojn kaj oni ellernis kelkajn novajn vortojn. Dum la sama tempo oni disdonis por trarigardo la fotojn, faritajn dum la pasinta kunveno kaj ĉiuj gelernantoj ricevis novajn adresojn por korespondado. Oni kantis la kanton „Vivu la verda stel!“ kaj lernis unu strofon de nova kanto: „Montaro Pirin“. Kiam ĉiuj alvenis la societa sekretariino per kelkaj vortoj klarigis la signifon de la nova junulara grupo. La lernantoj unuanime elektis kiel prezidanton de la junulara grupo la plej diligentan kursaninon k-inon Maria Karaĝova, lernantino en 7-a klaso. Oni elektis ankaŭ M. Japrakova, F. Janakieva, D. Hasĝijski kaj R. Behar.

La prezidanto de la societo k-do Trifonov per kelkaj vortoj salutis la junajn esperantistojn pri la fonda de la junulara grupo. Emociige parolis d-ro Anev. Kelkajn konsilojn donis ankaŭ k-doj Buĉavinov kaj Valjaviĉarski. Ĉiuj kuraĝigis la lernantojn kaj deklaris sian pretecon ĉiam helpi al ili. La renkonto kreis ponton inter la malnovaj kaj la novebakitaj esperantistoj kio ja estas ege necese por la fruktodona laboro estonte.

La junuloj tuj ekdeziris organizi ekskurson al Rila-montaro. La propono estis aplaŭde akceptita. En bona humoro kaj kantante en Esperanto ĉiuj forlasis la klubejon.

Ĥr. Veceva



Gelernanta kurso de Esperanto en Samokov

PRI LA VIII-a FESTIVALO DE LA JUNULARO

Antaŭ nelonge en Helsinko, Finnlando, okazis la unua kunveno de la internacia prepar-komitato por la VIII-a Monda Junulara Festivalo. Ĉeestis reprezentantoj de 5 internaciaj organizaĵoj kaj 90 landaj junularaj organizaĵoj de 50 ŝtatoj. Ĉeestis ankaŭ reprezentanto de MEM — s-ro Torpenten Martti.

La kunveno decidis ke la Festivalo okazu en Helsinko dum la somero de 1962. Estis elektita komisiono, kiu praktike zorgos pri la organizado de la Festivalo. Oni aprobis alvokon al la tutmonda junularo kaj leteron al la Centra Konsilantaro de la Suomia junularo.

En la alvoko interalie oni legas:

„Vivi sen timo, en paco kaj amikeco, konstrui unu mondon de prospero, de feliĉo estas unu el la plej malnovaj revoj de la homaro. Nia epoko povas esti la komenco de tiu erao kaj precipe la junuloj havas la devon labori pri tio kun ĉiuj siaj fortoj“.

La internaciaj renkontoj permesas pli bonan interkonatiĝon, pli bonan interkompreniĝon.

... La VIII-a festivalo, loko de renkontoj por la paco kaj amikeco, estas malfermita por ĉiuj. Ĉiuj deziras partopreni ĝin sendepende de iliaj politikaj konvinkoj, religiaj konfesoj, rasa aŭ nacieca aparteno. Nenies politika, ideologia aŭ religia tendenco dominos. La subteno de la Festivalo ne signifas neon de siaj propraj konvinkoj aŭ de sia aparteno al unu certa tendenco. Ĉiu povas esprimi siajn proprajn konvinkojn respektante tiujn de la aliaj. La VIII-a Festivalo estos unu libera kaj amika loko de renkonto de diversaj vidpunktoj kaj spertoj el ĉiuj aspektoj de la junulara agado. Ĝi okazos en reciproka estimo de la tradicioj de la popoloj kaj de ilia vivmaniero. Ĝi estos preparita kaj realigita kune kaj egalrajte de ĉiuj partoprenantaj organizaĵoj. La aligo estos ebla en kiu ajn momento de la preparlaboroj, al la tuta Festivalo aŭ al unu ĝia aparta aspekto, laŭ la deziro de la organizaĵoj.

Vizitu la VIII-an Mondan Festivalon de la junularo kaj la studentoj por paco kaj amikeco“

ORGANIZA VIVO

LA ESPERANTISTOJ APROBAS LA DECIDOJN DE LA PLENKUNSIDO

La sekretario de la Asocio Violin Oljanov vizitis en julio kelkajn esperantistajn societojn kaj konigis al ili la decidojn de la plenkunsido de CK de BEA kaj speciale la raporton pri la ideologia stabiligo de nia movado. Ĉie la esperantistoj aŭskultis kun granda intereso la raporton kaj partoprenis vigle la diskutadon. Ĉiuj unuanime aprobis la raporton. Multaj esprimis opinion, ke ĝi venis tro malfrue, ke delonge oni devis atentigi pri tiuj mankoj kaj problemoj de nialanda Esperanto-movado, por plibonigo ĝenerala de la laboro.

Societo „Paco“ en Bjala, kiu dum du jaroj dormis, nun montras surprizan aktivecon. Malgraŭ en plej arda kampara sezono, kiam la tuta urbanaro per brigadoj aktive partoprenis la agrikulturan laboron, la kunvenon ĉeestis 21 personoj (10 gejunuloj). La diskutojn partoprenis 5 esperantistoj.

Bonaj kunvenoj okazis en Ruse, kie ekzistas tri societoj. La kunveno de la uzina societo „Dimitrovec“ koincidis kun partia kunveno, kio malhelpis al multaj membroj ĉeesti. Sed la 14 ĉeestantoj (8 gejunuloj) kun granda intereso aŭskultis la raporton kaj direktis demandojn pri la internacia Esperanto-movado kaj pri tiuj problemoj de nia movado.

La kunvenon de la urba societo „Libero“ ĉeestis 40 personoj, preskaŭ la duono el kiuj estis gejunuloj. La diskutojn partoprenis 6 personoj. Aprobante la raporton oni asertis, ke tro malfrue ĝi estis iniciatita. Oni faris proponojn pri komenco de Esperanto-paĝoj en ĵurnaloj, aranĝoj por kvalifiko de lektoroj kaj de junularaj organizantoj, pri regulaj rilatoj kun la Urba Komitato de BKP, pri sistema ideologia laboro ktp.

La Fervojista Esperantista Societo en Ruse „Ponto de la Amikeco“ havas nur kelkmonatan vivon, sed ĝi estas jam matura organizaĵo. La kunvenon ĉeestis 20 personoj inter kiuj reprezentanto de la Urba Komitato de BKP kaj la partia sekretario de la vagona uzino. Partoprenis la diskutojn 5 personoj. La reprezentanto de la Urba Komitato de BKP kuraĝigis la membrojn por pli aktive partopreni en la Esperanto-movado.

La prezidanto de societo „Espero“ en Gorna Orjahlivca forestis de la urbo. Oni ne bone diskonigis la kunvenon kaj pro tio ĉeestis nur ses personoj. Tio estas rezulto ankaŭ de la neregula kunvenado de la membroj, kiuj perdis la kutimon pri tio. Du el la ĉeestantoj parolis pri la tuŝitaj problemoj, aprobante la raporton.

En stacidomo Gorna Orjahlivca ekzistas Fervojista Esperantista Societo „Mondlingvo“, sed lastatempe ĝi ne montras ian ajn agado. Kaj nun ĝi ne sukcesis kunvoki siajn membrojn. Venis nur kvar personoj. Eĉ la prezidanto, kiu devis organizi la kunvenon, venis nur ĉe la disiro.

La kunvenon de Esp. Societo „Lumo“ en Târnovo ĉeestis 30 personoj. Okazis vigla diskutado. Ĝin partoprenis 8 personoj. Oni akceptis tre bone kaj kontente la raporton. Oni parolis pri malbona konduto de iuj esperantistoj dum la pasintjara kongreso. Iuj montris ekzemplojn de Esperanto-gazetoj, kiuj konstante reklamas religiajn eldonaĵojn.

En vilaĝo Pordim estas vigla Esperanto—Societo „Verda Stelo“ kiu en la pasinta kongreso ricevis la transiran standardon de CK de BEA. Ĝi estas zorge gardata de la vilaĝa biblioteko. Sur unu breto de la sama oni povas vidi Esperantajn librojn. Estis sezono de plej vigla kampara laboro. Pro tio la kunveno estis destinita malfrue — je la 21 horo. Ĉu oni venos post laciga laboro? Jes, en la salono okupis lokojn 19 personoj (18 gejunuloj). Ĝi estas junulara s-to kaj pro tio estas libera de la eraroj de siaj pli grandaĝaj fratoj. Ili bone kunlaboras kun la Komsomolo. Signo de tiu kunlaborado estas la ĉeesto de la sekretario de la vilaĝa komsomola komitato.

La societo de Pavlikeni, kiu havas dujaran ekzistadon ne montris ĝis nun aktivecon. Sed venis por la kunveno 7 entuziasmaj esperantistoj. Ses el ili diskutis la problemojn de la raporto. Post la unua punkto pri la decidoj de la plenkunsido okazis jarkunveno. Estis elektita nova estraro, kiun eniris la nova entuziasma esperantistino Velička Geševa, sukcese fininta la korespondajn kursojn de Esperanto. Kiel prezidanto restis k-do Georgi Ganĉev kaj kiel prizorganto de la kursoj kaj propagando—la malnova esperantisto k-do Georgi Nestorov. La nova estraro estas tre esperiga kaj ni kredas, ke la esperantista societo en Pavlikeni baldaŭ plivigligos kaj plikreskos.

KOLAROVGRAD. Je la 24-a de majo, la stratoj de la urbo eksvarmis pro homoj. Estas festo de la bulgaraj skribo kaj kulturo, omaĝe al la fratoj Kirilo kaj Metodio, kiuj antaŭ pli ol 11 jarcentoj kreis la slavan alfabeton.

En tiu glora festotago preskaŭ la tuta loĝantaro de la urbo partoprenis en la festado.

La kolarovgradaj geesperantistoj ne postrestis. Ja ili ankaŭ estas parto de la popolo — naskinto de Kirilo kaj Metodio!

Kolektigis la geesperantistoj el ĉiuj generacioj kaj partoj de la urbo. Apud la plej malnovaj kaj maljunaj veteranoj estas la plej junaj kaj novaj adeptoj de la movado. Ĉiuj ili havas unu deziron — esprimi sian fortan volon vivi en paco kaj sian dankon al la unuaj slavaj instruistoj. Ĉi tie estas gelernantoj el la du gimnazioj, kie funkcias kursoj de Esperanto, laboristoj el la ŝtata maŝinkonstrua uzino. La plimulto estas gejunuloj.

Sur ĉies brusto brilas nia signo — la verda stelo. Al la gelernantoj estas donitaj po unu kolombeto kaj po unu verda flageto, kiujn ili devas alten levi, preterpasante la oficialan tribunon.

Por unua fojo la manifestacion partoprenas pli ol 80 geesperantistoj. La sloganoj kaj standardoj, kiujn portas la partoprenantoj, montras, ke niaj esperantistoj ne postrestas de sia epoko. La partopreno en la manifestacio estis grava sukceso por nia esperantistaro, tamen estas neceso ankaŭ daŭra organiza kaj kleriga laboro.

Al streĉa laboro, samurbanoj, por plena sukceso de Esperanto en nia urbo, kiu estas konata kiel naskiĝloko de la bulgara teatro!

Ilija Andreev

DRJANOVO. La novefondita Esp. Societo „Ivan Vladkov“ en Drjanovo disvolvis konsiderindan agadon dum la forpasinta lerno-jaro. Precipe oni zorgis pri instruado de la lingvo al laboristoj. Ek de januaro komencis funkcii kurso kun gvidanto N. Manev. Malgraŭ ke iuj kursanoj loĝis ekster la urbo, ili regule vizitadis la lecionojn. Kun sia persisto distingigis la lernantoj M. Nojkova, C. Marinova, C. Koleva, la laboristoj D. Genĉev, G. Ivanov kaj la oficistino D. Gateva. Post la fino de la kurso ĉiuj 12 gepartoprenantoj estiĝis membroj de la societo.

N. Nejkov



Esperanto-kurso en Drjanovo

DIMITROVO. La 15-an de junio la esperantistoj el la societo „Nova Vojo“ dum organiza kunveno diskutis pri nomigo de strato „Esperanto“ en la urbo kaj pri organizo de komencanta kurso en vilaĝo Rajkovo, proksima al la minejo „Al. Milenkov“.

En la fino k-do ing. Todorov rakontis impresojn pri la ekskurso de Varno ĝis Odeso.

AKTIVA KUNLABORANTO DE „BULGARA ESPERANTISTO“

PLOVDIV. K-do D. Ivanov el Plovdiv kolektis 75 jarajn kaj 55 duonjarajn abonojn por „Bulgara esperantisto“. Ni laŭdas kaj dankas al la fervora kamarado por lia abnegacia laboro.

SOFIO. Laŭ iniciato de k-doj M. Petrov kaj T. Pljunkov dum 1960 en la Ŝtata Plana Komisiono funkciis du kursoj por komencantoj. Sukcese finis 35 kursanoj, la plimulto de kiuj estiĝis anoj de la urba Esp.-Societo „M. Gorkij“. Tíamaniere estiĝis ebla la fondo de Esp.-grupo ĉe tiu ĝrava ŝtata institucio.

La novaj esperantistoj daŭre perfektiĝis en la „parolanta rondo“ gvidata de k-do M. Langov kaj vizitis la kongreson en Tárnovo per aŭtobuso de la Ŝtata Plana Komisiono. Dum la nova lernojaro k-do K. Válev gvidis perfektigan kurson, kiu sukcese finiĝis en printempo. La Esp.-grupo laboras laŭplane.

Jam dua jaro ekzistas la lernanta Esp.-grupo ĉe Kolarova distrikto de Sofio; la 20 lernantoj (de V-a ĝis VII-a klaso) vizitadis pli ol 60 lernohorojn la kurson gvidata de ilia instruistino k-dino J. Kozačeva.

La 5-an de junio en leĝejo „Stilijan Pešev“ okazis ĉarma festo. Ĉeestis la gepatroj de la lernantoj kaj gastoj de S-to „M. Gorkij“ kaj de CK de BEA.

La instruistino disdonis premiojn al la sukcese finintaj post kio la lernantoj plenumis mallongan programon de Esperantaj kantoj pri la paco kaj junula kamaradeco.

K-doj Moraresku, Iv. Sarafov, G. Dimov el Varna kaj Simeon Ĉorbaĝiev el Pleven salutis la lernantojn kaj esprimis sian kontenton pri la atingitaj sukcesoj en la lernado de Esperanto.

Jen estas du ekzemploj de imitinda agado inter la lernantoj kaj en la entreprenoj konforme al la spirito de la lastaj decidoj de CK de BEA.



La infana grupo en kvartalo „Nadejda“ — Sofio, prezentas artan Esperanto-programon

NIKOPOL. Gasto de la esperantistoj en nia urbo estis la pola k-do Juzef. Piduh, kiu de kelkaj jaroj korespondas kun la k-doj T. Jančev kaj Pl. Ivanov. Kiam la poŝtistoj ekscilis pri la alveno de la gasto, ili tuj invitis lin al amika renkontiĝo. En la renkontiĝo la pola k-do rakontis pri la vivo de la frata popolo kaj deklaris sin mirigita de la grandega kon-

strulaboro „en ĉarma kaj gastema Bulgario“. Interalie li diris ankaŭ, ke dank' al Esperanto li sukcesis kontaktiĝi kun 57 geamikoj el ĉiuj kontinentoj.

Al la-gasto oni prezentis donacojn.

Georgi Lazarov

EKSKURSO DE BULGARAJ ESPERANTISTOJ AL ODESO

De la 8-a ĝis la 11-a de junio 1961 Bulgara Esperantista Asocio kaj „Balkanturist“ organizis ekskurson de esperantistoj per vaporŝipo. La ekskurson partoprenis 60 geesperantistoj el ĉiuj distriktoj de la lando.

La ĝojo de la bulgaraj esperantistoj estis senlima, ĉar ni arde deziris vidi Sovetion, la landon pri kiu ni ĉiuj revis.

La 8-an de junio ni ĉiuj jam kolektiĝis ĉe la haveno de Varna. Antaŭ ni brilas la blanka kaj bela ŝipo „Vasil Kolarov“. Ni ĉiuj estas babilemaj, gajaj, ridemaj. Jen ni estas sur la ŝipo kaj niaj kamaradoj el la Esperanto-societo „Albatro“ en Varna nin fotografas.

Filirtas la bela silka standardo, kiun ni kunportas kiel donacon por la odesaj esperantistoj. Brilas pro ĝojo la okuloj de la veturontoj. Lasta signalo kaj nia bela veturanta domo eknagas. „Ĝis revido! Salutojn al la odesaj gekamaradoj!“ Kaj la ŝipo pli kaj pli rapide naĝas sur la maro. Antaŭ ni kiel en filmo viciĝas la bildoj de la pitoreska bulgara marbordo. Jen somerrestadejo „Varna“, „Balkanturist“, la „Ora Strando“ kaj centoj da blankaj ripozdomoj meze de abundaj vituoj kaj ĉemaraj arbaroj. La koroj tremas pro emocio — la okuloj brilas pro ĝojo. . . La Nigra maro estas nun trankvila. La ŝipo naĝas apenaŭ balanciĝanta. Super ni flugas niaj lastaj adiaŭantoj — la mevoj de nia marbordo. — „Jen promontoro Kaliakra“ — diras iu kaj ĉiuj rigardoj direktiĝas al terkabo eniĝinta profunde la maron. „Kiel bele! Kiel majeste bele!“ . . La invito pri tagmanĝo deŝiras nin de la ekstera beleco, por ĝui la bongustajn manĝaĵojn.

Ĉirkaŭ ni estas nur marakvo, la bordo ne plu estas videbla. En babilado kaj rido ni ne rimarkis kiam forkuris la tago kaj jen proksimiĝas sunsubiro, belega, nefotgesebla sunsubiro meze de la maro. . .

Delonge ni jam veturas preter la soveta marbordo, vidiĝas jam la sovetaĵ kuraclokoj kun la blankaj ripozdomoj kaj vilaoj, kaj jen ni eniras en la grandan havenon de Odeso plena je multaj ŝipoj.

Ni estas jam en la aŭtobusoj de „Inturist“ kaj ni faras la unuan rondiron tra la urbo. La gvidantino detale rakontas al ni pri la historio de la urbo, pri la stratoj kaj pri la gravaj institucioj preter kiuj ni pasas. Tagmanĝo en la ŝipo, mallonga ripozo kaj denove en la aŭtobusoj. Posttagmeze ni vizitis la kolhozon de vilaĝo Ĉernomorka. Renkontis nin la ĉefagronomo en la bela kulturdomo kaj li multon

rakontis al ni pri la kolhozo fondita en 1930. Li menciis dekojn da ciferoj montrante la konstantan kreskon de la produktado en ĉiuj ĝiaj fakoj kaj fine konigis al ni la estontan planon de la kolhozo.

La duan tagon denove promenado tra la urbo. Ni vidis la belegan stacidomon, la largajn bulvarojn kaj la multajn novkonstruitajn kvartalojn kies loĝejdomoj brilis pro pureco. Kelkfoje ni trapasis la historian Potemkinan Ŝtuparon sur kiu dum la unua revolucio en 1905 la caraj ĝendarmoj mortpafis pli ol 2,000 batalantoj por liberigo el la cara reĝimo.

La magazenoj estas plenaj je varoj. La bonhumoraj aĉetantoj estas bone vestitaj. En la sama tago ni vizitis uzinon kiu produktas metaltrancantajn maŝinojn. Renkontis nin afable la ĉefingeniero. Li detale rakontis al ni pri la historio kaj la produktkapacito de la uzino. Bele aranĝitaj parkoj ornamitaj per aŭtooj kaj diversaj diagramoj pri la kresko de la produktado, fotoj de la premilitaj gelaboristoj, infandomo, infangardeno por la infanoj de la laborantaj patrinoj.

La trian tagon ni vizitis la muzeon de la rezistado, kie ni konatiĝis kun la heroo historio de urbo Odeso kaj kun la gloraj bataloj.

de la odesaj civitanoj kontraŭ la germanaj okupantoj dum la lasta mondmilito. Fine ni vidis la bildgalerion de Odeso, kie ni longe ĝuis al la belegaj originalaj verkoj de famekonataj pentristoj.

Apartan ĝojon ni travivis kiam ni renkontiĝis kun la geesperantistoj el Odeso. Kortuŝa frata renkontiĝo. Kiam ni transdonis al ili la ruĝan silkan standardon kun verda stelo donace de la bulgaraj esperantistoj al esperantistoj en Odeso, mi vidis larmojn pro ĝojo en la okuloj de la malnovaj pioniroj de la Esperanto-movado en Odeso.

Sed la tempo rapide pasas, la 11-an de junio, vespere la bulgara ŝipo „Vasil Kolarov“ kun siaj gajaj kaj kontentaj ekskursantoj forlasis la sovetan bordon. Sur la bordo restas nur niaj sovetaj amikoj svingantaj manojn. Kaj nia belega ŝipo kiel grandega packolombo direktiĝas al la Patrolando. Ĉe la haveno de Varno nin renkontis la lokaj esperantistoj. Gajaj kaj scivolemaj, ili pridemandas nin pri la sovetaj geesperantistoj. Kaj fine gajaj kaj kontentaj ni disiras al diversaj partoj de nia lando por rakonti al miloj da homoj pri la belegaj tagoj en Odeso.

Tinka Lakova



Sovetiaj kaj bulgaraj geesperantistoj dum la renkontiĝo en Odeso la 10. 6. 1961

LA MALGRANDA SOVETA ENCIKLOPEDIO PRI ESPERANTO

La Malgranda Soveta Enciklopedio enhavas artikolon „Artefaritaj lingvoj“ en la 4-a volumo, p. 214:

„Artefaritaj lingvoj — lingvoj diference de la naturaj, kreataj konscie, plej ofte por plenumi rolon de internacia helpa lingvo. Plej konata el la artefaritaj lingvoj estas Esperanto. Antaŭ ĝi certan sukceson ĝuis Volapük. Ĉiuj ceteraj artefaritaj lingvoj disvastiĝis malmulte (Ido, Occidental, Novial, Interlingva)“.

10-a vol., p. 986:

„Esperanto, artefarita internacia lingvo, ricevinta sian nomon de la pseŭdonimo de la kreinto de la projekto, d-ro L. L. Zamenhof (Varsovio). La unuaj lernolibroj de Esperanto aperis en 1887 en Varsovio, en rusa, pola kaj lingvoj. La gramatiko de Esperanto, konstruita laŭ la tipo de la aglutinaj lingvoj, estas entenata en 16, reguloj, kiuj ne permesas esceptojn. Ĉiuj substantivoj finiĝas per o, ĉiuj ad-

jektivoj — per a ktp. Laŭ severe reguligita sistemo de sufiksoj kaj prefiksoj efektiviĝas la karaktero por la hindeŭropaj lingvoj vortfarado; kunmetitaj vortoj formiĝas per simpla vortkunmetado. La radikoj de Esperanto estas prenataj ordinare el la vortoj, kiuj fariĝis internaciaj. En Esperanto ekzistas beletristiko, scienca kaj populara literaturo, tradukita kaj ankaŭ originala. Organizaĵoj de esperantistoj ekzistas en multaj landoj. En Esperanto aperas ĉirkaŭ 100 gazetoj, inkluzive „Nuntempa Bulgario“, „El popola Ĉinio“, „Vietnamio antaŭenmarŝas“ ka. En 1959 en Varsovio okazis la 44-a Universala Kongreso de la esperantistoj, kiun ĉeestis pli ol 3000 delegitoj el 63 landoj. Kiel helpa rimedo por kontaktoj Esperanto faciligas la lernadon de la diversaj lingvoj, precipe de la romanidaj. Iuj lingvis-

toj ne konsentas, ke Esperanto estas uzebla kiel artefarita internacia lingvo“.


Tia estas la enhavo de ambaŭ artikoloj, kiujn ni legas en la Malgranda Soveta Enciklopedio. La dua artikolo ne estas mallonga, se oni konsideras, ke la enciklopedio havas nur 10 volumojn kaj ĝia enhavo estas orientita pli multe al aliaj fakoj de la scienco ol al la lingvistiko. Ni dankas al la Redakcio de Malgranda Soveta Enciklopedio pro la objektiva, favora, scienca informo pri Esperanto kaj ni rekomendas, ke la lingvistaj kunlaborantoj studi pli detale la nuntempajn sukcesojn de nia movado kaj la sukcesojn en la originala kaj traduka literaturoj en Esperanto.

Simeon Hesapčev

LA ĈEFA DEKLARO DE LA XVI-A POLLANDA ESPERANTO-KONGRESO

La partoprenantoj de la XVI-a Pollanda Esperanto-Kongreso en Wrocław, okazinta la 29/IV—1/V. 1961:

1) Konstatas kun vera kontento, ke la ideo de la Esperanta movado trovas en Pollando ĉiam pli bonan komprenon kaj subtenon ĉe ĉiuj tavoloj de la pola socio kaj ankaŭ ĉe la registaroj kaj partiaj instancoj.



Wrocław — Pollando

2) Ili dankas elkore al la Ĉefministro Józef Cyrankiewicz kaj al la Centra Oficejo de la Ministro-Konsilantaro, al Ministroj de Klerigo kaj Kulturo kaj Arto, kaj al la Centra Komitato de la Pola Unuiĝinta Laborista Partio — pro ilia favora sinteno al la agado de Pola Esperanto-Asocio kaj pro la helpo kaj zorgado al ĝi montrata.

3) Ili konsideras, ke la plej aktuala afero por nia Esperanto-movado estas la afero de enkonduko de Esperanto en lernejojn. Pro tio ili plene subtenas la agadon de la Lerneja Komisiono de Pola Esperanto-Asocio en tiu direkto kaj petas ĉiujn kompetentajn instancojn ŝtatajn kaj sociajn — je subteno de tiu agado, kiu havas por Polio, kiel patrujo de Esperanto, specialan signifon same nacian kiel internacian.

4) La partoprenantoj de la kongreso turnas sin al ĉiuj membroj de la Registaro, al ĉiuj deputitoj de la Parlamento de Pola Popola Respubliko kun peto, subteni la alpaŝon de Universala Esperanto-Asocio al ĉiuj registaroj de UNO rilate al la Interŝtata Esperanto-Akordo pri enkonduko de Esperanto en lernejojn kaj je aliĝo de Pollando al tiu Konvencio.

5) La Kongreso turnas sin al la Centra Konsilantaro de Laboristaj Sindikatoj, precipe al Sindikato de Pola Instruistaro, al la Pola Radio kaj Televido kaj al la Estraroj de ĉiuj amasaj sociaj organizaĵoj, speciale al Asocioj de Pola Junularo, de Polaj Sciencistoj kaj Literaturistoj kaj Artistoj kun la peto — subteni la esperantajn ideojn, dankante samtempe al ilia ĝisnuna favora sinteno al nia movado.

6) La Kongreso turnas sin al ĉiuj membroj kaj simpatiantoj de Esperanta movado kun alvoko, kiel eble plej vigle propagandi Esperanton en siaj medioj, perfektigi en kono de la lingvo kaj uzi ĝin en la internaciaj kontaktoj.

REZOLUCIO POR LA DEFENDO DE LA PACO

La polaj esperantistoj, kunvenintaj dum la XVI-a Pollanda Esperanto-Kongreso en Wrocław, protestas energie kontraŭ ĉiuj provoj de atenco kontraŭ la paco en la mondo — kaj promesas stari fidele ĉe la principoj de Esperanta movado, proklamantaj fratigon de ĉiuj nacioj en la tuta mondo sendepende al koloro de haŭto, kredo aŭ aliaj konvinkoj.

La atingoj de Sovet-Unio sur la kampo de scienco kaj progreso, precipe la penetro en

la kosmon fare de majoro Gagarin atestas klare pri tio, ke ĉiuj atingoj de la scienco povas esti jungitaj en la servon por homaro.

Pro tio la polaj esperantistoj turnas sin kun varma alvoko al esperantistoj de la tuta mondo, ke ili ne laciĝu en ilia celado — ankoraŭ pli forte unueciĝi en la batalo por la Paco, por ke la tiel impone evoluanta scienco kaj la ĉiam pli perfekta teknika progreso servu por la bono de la homaro — por afero de la paco.

DEZIRAS KORESPONDI

ANGLUJO

17-jara J. L. Philips, Altrol House, Porthrepta Rd., Carbis Bay, St. Ives, Cornwall.

GDR — GERMANIO

Rudolf Müller, tramisto, Dresden A 28, Kesseldorferstrasse 55

Dudekjara f-ino Christa Zimmermann, Leipzig—05, Ludwigstr. 54

Muzikisto Rudi Deke, Dresden — A 27, Frankfurter str. 5 — pri muzikaj problemoj, pri distra kaj popola muziko.

GFR — GERMANIO

Sesdekjara germana fervojisto Adolf Schrittenlacher, Minden en Westfalujo, Herzog, Ferdinandstr. 10 a — kun samfakuloj.

ĈSSR.

A. V. Zedník, Modrány 1482, Praha — kun esperantistoj — ciganoj.

28-jara fraŭlo, terkulturisto, Jan Kašparek, Nizkov 25.

POLLANDO

Betty Halasymowicz, Lielona 60112, Sowińskogo 23/3 — 11-jara esperantistino. Interŝ. PK, libroj.

INDONEZIA

S-ro Supangin, Keparakan kidul Mg IV/184, Jogjakarta, Djawa Tengah-Interŝ. librojn, revuojn, PK, bildojn.

DANIO

3 denaskaj esperantistoj (10, 8,4-jaraj) okazigos naskiĝotagan leterfeston la 15-an de septembro. Alskribaĵoj estos filatele aranĝitaj por demonstrado ĉe ludokamaradoj, en lernejo ktp. Ĉiu alskribinto ricevos raporteton. Adreso: Peter, Ole kaj Henrik Schleicher, Ved Bella-hoj 30 B., 7., Kopenhago, Brh.,

BULGARIO

Kosta Tringov, Svilengrad — kun ĉi pri ĉi. Interŝ IK.

USSR

Boris Kolker, poŝkesto 12, Kiŝinev — centro, Moldavio — pri interlingvistiko, esperantologio, ĝenerala lingvoscienco kaj permaŝina tradukado. Korespondas en lingvoj Esperanto rusa, angla, franca, rumana kaj bulgara.

Moldavia Respublika Biblioteko starigis Esperanto-Fakon. Nepre kontribuu sendante librojn kaj kompletajn jarkolektojn de Esperanto — gazetoj. Adreso: Moldavio, Kiŝinev, str. Kievskaja 78-a, Moldavia Respublika Biblioteko, Esperanto — Fakoj.

REDAKTA KOMITATO

Canko MURGIN (respondeca redaktoro), Atanas LAKOV, Ivan SARAFOV,
Kiril DRAJEV, Simeon D. SIMEONOV, Violin OLJANOV

Korektis: D. Ĉolakov

Formato 71×100/16

Eldonkvanto 3000 ekz.

Adreso: Bulv. Dondukov 57, Tel. 7-46-01, Sofio, Poŝkesto 66

Ŝtata presejo „T. Dimitrov“, filio 2 — Sofia; mendo №7450/61

БЪЛГАРСКИ ЕСПЕРАНТСКИ СЪЮЗ
ЦЕНТРАЛЕН КОМИТЕТ

СОФИЯ, П. К. 66

6 юли 1961 г.

ДО ЕСПЕРАНТСКИТЕ ДРУЖЕСТВА
В БЪЛГАРИЯ

ОКРЪЖНО

№ 5

ОТНОСНО: Културно-просветната работа.

С настъпването на летния сезон културно-просветната работа на есперантските дружества обикновено отслабва, а на някои места тя почти замира. Като се има пред вид голямото значение на добре организираната и целенасочена културно-просветна и идейно-масова работа за идеологическото издигане на есперантистите и за тяхното възпитание в дух на патриотизъм и пролетарски интернационализъм, за ефикасна борба с вредните влияния на разни антипролетарски, космополитични, религиозни и други учения, за все по-тясното свързване на есперантските дружества с останалите масови организации за подпомагане изпълнението на стопанските планове, ЦК на БЕС препоръчва културно-просветната работа да продължи и през лятото, а през есента тя да се подеме с по-голям размах.

За да улесни ръководствата на дружествата в подбора на тематиката и правилното разработване на отделните теми за беседи, бюрото на ЦК на БЕС разработи и ще отпечата на циклостил редица актуални беседи, които предстои да се изнесат на добре организирани просветни събрания на дружествата по места. Тези беседи ще бъдат написани на есперанто или на български език. Беседите са следните:

1. „За идейното укрепване на Българския Есперантски съюз“ от Христо Горов. Тя трябва да се изнесе пред възможно най-голям брой есперантисти от добре подготвен другар от ръководството на дружеството.

2. „Участие на есперантистите в социалистическото строителство“.

3. „Проблемът на международния език и есперанто“.

4. „Международното есперантско движение“.

5. „Работническото есперантско движение у нас“.

6. „Дисциплината в есперантското движение“.

7. „Есперанто в помощ на балканското сътрудничество“.

8. „Международният език и мирното съвместно съществуване“.

9. „Есперанто и художествената литература“.

10. „Поезията на Никола Вапцаров“.

Ръководствата на дружествата освен тези теми могат да включат в своите просветни планове и други подходящи теми по въпросите на езика, есперантското движение, есперантската литература и др., чрез които по-пълно и по-добре ще се помогне за разгръщане на една широка, целенасочена и резултатна културно-просветна и идейно-масова работа.

За направеното да се донесе до ЦК на Съюза най-късно до 15 септември т. г., а за проведената културно-просветна дейност, трудовите прояви и пр. изпращайте редовно къси, но съдържателни дописки до редакцията на сп. „Булгара Есперантисто“.

Председател: Хр. М. Горов

Секретар: В. Олянов



Gekamaradoj,

abonigu viajn korespondantojn en eksterlando al „Bulgara Esperantisto“!

